



### **Liana TUĤVATULLINA**

doktoro pri juro, profesoro,  
estro de katedro pri internaciaj lingvoj  
de Eŭropa Jurscienca Universitato Justo

### **Instruado de fremdaj lingvoj. Problemoj kaj solvoj**

**N**i vivas dum la epoko, kiam pli kaj pli multe da landoj kaj popoloj unuigas siajn fortojn por plivastigo de internacia komunikado kaj solvo de tutglobaj problemoj en klerigado. Lige kun tio ege aktualiĝis la temo pri efikeco de fremdlingva instruado. Oni scias, ke kono de fremda lingvo plialtigas konkurenckapablon de specialisto kaj lian valoron en labormerkato, kio, siavice, plifortigas ekonomikon de la ŝtato.

Tial en 2002 Barcelona Konsilio el ministroj de Eŭrouniaj ŝtatoj rekomendis studon de minimume du fremdlingvoj ek de frua aĝo<sup>1</sup>. La rekomendo gravas ankaŭ por Rusio, ĉar ĝi subskribis Bolonjan konvencion pri eniro en unuigitan eŭropan klerigan spacon.

Rusiaj klerigaj standardoj<sup>2</sup> antaŭvidas por studado de fremda lingvo 204 horojn en elementa lernejo, 525 horojn – en la 5-a ĝis la 9-a klasoj kaj 210 horojn – en la 10-a ĝis la 11-a klasoj de mezlernejo, t.e. sume 939 horojn por la tuta lerneja periodo. En la superlerneja periodo la studado de fremda lingvo konsumas 340 horojn. Do, entute fremdlingva studado en elementa, meza kaj supera lernejoj ampleksas minimume 1279 horojn. Se konsideri, ke multaj lernejoj kaj studentoj uzas aldonajn eblecojn en lingvolernado, tiam la tempoinvesto ampleksos ĉirkaŭ 2000 horojn. Tio korespondas al la tempoinvesto, kiun lingvistoj konsideras bezonata por sistema lernado de meze komplika lingvo.

Samtempe efikeco de lingvolernado restas malĝojige malalta: nuraj 7,39% de rusia loĝantaro<sup>3</sup> posedas fremdajn lingvojn<sup>4</sup>. Ne helpas eĉ

<sup>1</sup> Presidency conclusions. Barcelona European Council 15 and 16 March 2002. [http://ue.eu.int/ueDocs/cms\\_Data/docs/pressData/en/ec/71025.pdf](http://ue.eu.int/ueDocs/cms_Data/docs/pressData/en/ec/71025.pdf)

<sup>2</sup> Baza studplano konfirmita de Ministerio pri klerigo de Rusia Federacio la 09-an de marto 2004; standardoj de specialecoj por supera profesia klero de la dua generacio.

<sup>3</sup> Laŭ la datenoj de Federacia oficejo de ŝtata statistiko, <http://www.gks.ru/wps/portal>

multego da lingvaj lernejoj kaj kursoj. Laŭ la eksperta opinio, la entuta kvanto de lingvaj kursoj en Rusio, kiuj ofertas kontentigan kvaliton de instruado, ne superas 50%, se kalkuli la ŝtatajn, ministeriajn kaj aŭtorajn lernejojn<sup>5</sup>. Eŭropanoj tiel formulis la situacion en la fremdlingva lernado: tio estas *malfacila, longa kaj multekosta*.

Konsiderante tion revoj de kleriga komunumo sekvi la tendencojn de lingva plureco kaj prepari specialistojn kun kono de du fremdaj lingvoj ŝajnas tute nerealigeblaj. Eĉ pli nerealigebla por nia lando evidentiĝas la proklamo far' UNESKO de la 21-a jarcento kiel jarcento de poliglotoj.

Dum longa tempo okazadas ke malpli kaj malpli da lingvoj estas instruataj en mezaj kaj superaj lernejoj, en multaj kazoj la sola fremda lingvo estas la angla.

Specialistoj pri lingva instruado tutanime opinias, ke la situacio, kiam la angla anstataŭas aliajn fremdlingvojn, ne devas resti senkontrola. Eŭropo jam maltrankvilas, antaŭvidante danĝerajn postsekvojn de instruado de fakte sola fremda lingvo, kio okazis dank' al senzorgemo de la kontrolorganoj pri klerigado. Rezulte Eŭropo riskas perdi sian ĉefan riĉaĵon – kulturen kaj lingvan diversecon. Tiu danĝero ne malpli rilatas ankaŭ Rusion, unun el la plej multnaciaj ŝtatoj en la mondo.

Nun surlime de malapero troviĝas laŭ diversaj fontoj de 500 ĝis 3000 etnolingvoj, kaj laŭ kelkaj prognozaj dum la proksimaj jardekoj ilia kvanto restos nur ĉirkaŭ 600. Postsekvoj de perdo de lingva diverseco reflektiĝas en lingva medio, socio, akademia komunumo: ja kun lingvoj malaperas naciaj kulturoj kiel ilia nepra parto.

Unu el la gravaj faktoroj, kiuj kontribuas formorton kaj degradon de lingvoj, estas uzado de etna lingvo kiel ilo de internacia komunikado kaj, konsekvence, ĝia domino kaj subigo de malgrandaj lingvoj. Laŭ la esploro<sup>6</sup> de François Grin, profesoro de Genova Universitato kaj specialisto pri lingva ekonomiko, enspezoj, kiujn ricevas Britio dank' al dominado de la angla lingvo en la mondo (kaj en Eŭropa Unio), ampleksas 17–18 miliardojn da eŭroj ĉiujare, t.e. 1% de la nacia produkto. El tio sekvas, ke

<sup>4</sup> Tie ĉi temas pri fremdaj lingvoj, uzataj en internacia komunikado kaj lernataj kiel fremdaj en rusiaj lernejoj (la angla, germana, franca, hispana, itala).

<sup>5</sup> Baraš O. Jazikovije kursi i školi vseh stran, objedinjajtesj! (Lingvaj kursoj kaj lernejoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!) // "Obučeniĝe za rubefom". N 5. Maj 2005.

<sup>6</sup> François Grin. L'enseignement des langues étrangères comme politique publique. Rapport établi à la demande du Haut Conseil de l'évaluation de l'école. (Instruado de fremdaj lingvoj kiel socia politiko. Raporto verkita je la peto de la Alta Konsilio pri Taksado de la Instrusistemo.) N 19. Septembro 2005.

ĉiu el la 280 milionoj de ne-britoj en Eŭropa Unio ĉiujare direktas 65 eŭrojn por subteni britan ekonomikon. Proponante komparon inter la tri eblaj scenaroj de lingvopolitiko en Eŭrouniaj organoj: (1) la angla kiel sola lingvo, (2) trilingveco la angla–germana–franca kaj (3) elekto de esperanto kiel laborlingvo, – li konkludas, ke la tria varianto kun granda avantaĝo evidentiĝas la plej malmultekosta kaj egalrajta. Ŝparo estas atingebla per du vojoj. Unuflanke, simpleco de Esperanto ebligas elspezi malpli da mono por instruado de fremdaj lingvoj – kvankam la esploro konsideras enkondukon de dua fremda lingvo en la lernejoj de ĉiuj Eŭrouniaj ŝtatoj, inklude Unuiĝintan Reĝlandon. Aliflanke, dank' al tio, ke Esperanto apartenas al neniu ŝtato, varoj kaj servoj, ligitaj kun ĝia instruado, povas esti produktitaj en ajna lando kaj konsumitaj de ĉiuj aliaj.

Analogajn konkludojn entenas la esploro de laŭreato de Nobel-premio, habilita doktoro pri ekonomiko, profesoro R. Selten: enkonduko de Esperanto en studplanojn de mezaj kaj superaj lernejoj ne nur ne postulos aldonajn financajn elspezojn, sed male, estos ekonomike profita, ĉar je sama mona kaj tempa investo, kiujn ajna ŝtato atribuas por studado de unu fremda lingvo, lernanto ekposedas ne unu, sed du lingvojn – la fremda etna kaj Esperanto<sup>7</sup>.

La aŭtoro de Esperanto L.L. Zamenhof okupiĝis pri aktiva serĉado por solvi la problemon de mankanta helpilo por internacia komunikado, kiu provizus egalajn rajtojn al ĝiaj partoprenantoj. Esperanto ekde la tempo de sia naskiĝo asociiĝas kun la spirito de unueco, reciproka helpo, respekto de homaj rajtoj. Tiun parton de lingva kulturo ne eblas ignori, samkiel malfacilas forigi asociigon de la angla lingvo kun la koloniiga pasinto kaj rasismo.

Dum preskaŭ 120 jaroj Esperanto elproviĝis en ĉiuj sferoj de la homa agado – de ĉiutaga komunikado en familio ĝis verkado de sciencaj traktatoj en ĉiuj sciencbranĉoj. Ĝi estas laborlingvo de kelkaj akademioj, en ĝin estas tradukita preskaŭ la tuta klasika literaturo, en ĝi estas kreitaj kaj kreataj milionoj da paĝoj de prozo kaj poezio. Gravas, ke ĝi plenumas sian mision kiel *helpa* internacia lingvo, edukante respekton por lingvaj homrajtoj kaj proksimigante homojn. Tiuj atingoj kaj praktika signifo de Esperanto estas distingitaj per du rezolucioj de UNESKO, kiuj rekomendis ĝian enkondukon en studplanojn de mezaj kaj superaj lernejoj. Hodiaŭ

<sup>7</sup> Frank H., Selten R. Dulingva Eŭropo. Paderborn, 2004. P. 37.

Esperanton oni instruas en multaj universitatoj en dekoj da landoj, inklude kvar moskvajn superlernejojn.

Konsiderante lingvajn specifajojn de Esperanto, elspezoj por ĝia sistema lernado kalkulas 200 horojn, t.e. 1/10 de la tempo, kiun postulas lernado de meze komplika etnolingvo, aŭ 1/8 de la tempo, kiun postulas lernado de dua fremda lingvo<sup>8</sup>. Tamen intereson vekas ne nur tio. La rezultoj de multnombraj esploroj atestas, ke infanoj, komence lernintaj Esperanton kaj poste – fremdan lingvon, atingas pli bonajn rezultojn en lernado de fremda lingvo. Tiu fenomeno nomiĝas “efekto de propedeŭtika valoro de Esperanto”. Elokventas la rezultoj de kelkaj eksperimentoj en Esperanto-instruado<sup>9</sup>:

- 1918–1921, mezgrada lernejo por knabinoj en Bishop Auckland, Britio: *la rezultoj de la eksperimento montris, ke racia kaj simpla Esperanto-gramatiko kreas ponton, speciale por malpli talentaj infanoj, por plifacila transiro al la komplika gramatiko de la franca kaj germana lingvoj; konatigas lernantojn kun internaciaj vortoj.*
- 1925–1931, Kolumbia Universitato, Novjorko, Usono: *post 20-hora lernado de Esperanto meza studento komprenas Esperantajn tekstojn kaj paroladon pli bone, ol tekstojn kaj paroladon en la franca, germana, itala aŭ hispana lingvoj post 100 horoj de ĝia lernado. 5-hora studado de la germana donas preskaŭ neniun rezulton, 5-hora studado de Esperanto sufiĉas por ĝenerala kompreno de la tuta Esperanta gramatiko. Angleparolantaj studentoj montras pli bonajn rezultojn en studado de la latina, germana kaj franca, se antaŭe ili studis planlingvon kiel propedeŭtikan kurson.*
- 1947–1951, mezlernejo, Sheffield (ek de la 1948 ankaŭ en Manchester), Britio: *infano lernas tiom de Esperanto dum 6 monatoj, kiom de la franca dum 4–5 jaroj; post kelkmonata instruado de Esperanto lernantoj montras pli bonajn rezultojn en aliaj lingvoj.*
- 1958–1963, mezlernejo Somero, Finnlando: *la eksperimento sub la kontrolo de Kleriga Ministerio montris, ke post Esperanta kurso*

<sup>8</sup> Laŭ la kalkuloj de lingvistoj, sistema lernado de dua fremda lingvo postulas 1600 horojn.

<sup>9</sup> Studo de Komisiono pri la lingvo internacia (nomita Esperanto) // Bollettino Ufficiale del Ministero della Pubblica Istruzione (Oficiala Bulteno de Kleriga Ministerio), n. 21–22, 25 majo – 1 junio 1995, pp. 7–43.

*lernantoj atingas pli altajn rezultojn en la germana lingvo, ol tiuj, kiuj lernis nur la germanan dum pli longa tempo.*

- 1962–1963, Universitato Eötvös Lorand, Budapeŝto, Hungario: *studado de la rusa, germana, angla kaj franca lingvoj en mezlernejaj klasoj post dujara studado de Esperanto. La lernfacileco de la rusa altiĝis je 25%, de la germana – je 30%, de la angla – je 40%, de la franca – je 50%.*
- 1975 – komenco de la 1980-aj, Instituto pri Kibernetika Pedagogio de Paderborna Universitato, Germanio; la eksperimento “Lingvo-orientiga instruado”: *konfirmo kaj scienca klarigo de propedeŭtika efekto de Esperanto-instruado surbaze de empiriaj kalkuloj kiel preparo de germanaj lernantoj por posta lernado de la angla lingvo. Dum postaj jaroj al la eksperimento aliĝis lernejoj de Francio, Italio, Jugoslavio. La rezultoj de la eksperimento konfirmis, ke lingvo-orientiga instruado (1) signife altigas intereson de lernantoj al la diverseco de eŭropaj kulturoj kaj lingvoj, (2) ŝparas tempon, kiun eblas uzi por instruado de aliaj fremdaj lingvoj, (3) plifaciligas eĉ instruadon de la gepatra lingvo, geografio kaj matematiko, (4) kreas por infanoj eblecon de interetna komunikado sen limigo en elekto de landoj laŭ lingva kriterio, tiamaniere kontribuas al pli bona interpersona kompreno sen lingva diskriminacio.*
- 1983–1988, Elementa Lernejo “Rocca”, San Salvatore di Cogorno, Ĝenova provinco, Italio: *la lernejoj, kiuj komence studis Esperanton kaj poste la francan, atingas pli altajn rezultojn, ol tiuj, kiuj studis nur la francan.*
- 1993, Instituto pri Kibernetika Pedagogio de Paderborna Universitato, Germanio, Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino; eksperimento “Lingvo-orientiga instruado” en lernejoj de Italio, Rusio, Ukrainio, Uzbekio kaj Kazahio, ek de la 1994 ankaŭ en lernejoj de Slovenio, Aŭstrio kaj Hungario: *lernejoj, kiuj studis dum du jaroj Esperanton kaj poste du jarojn la anglan, montras pli bonajn rezultojn en la angla, ol tiuj, kiuj dum kvar jaroj lernis nur la anglan.*
- 1993–1997, lernejo Gaetano Salvemini, Torino, Italio; eksperimento “Propedeŭtika lingvo en fremdlingva instruado en elementa lernejo”: *en la dua kaj tria klasoj lernejoj studas Esperanton kaj*

uzas ĝin por internacia komunikado kun aliaj lernejoj. En la kvara kaj kvina klasoj unu grupo transiras al lernado de la angla, la alia – de la franca lingvo. Ek de la lernojaroj 1994/1995 la rezultoj de la eksperimento estis aprobitaj de Kleriga Ministerio, kiu konfirmis la propedeŭtikan valoron de Esperanto-instruado de italaj lernejoj por pli sukcesa kaj rapida posta lernado de la franca kaj angla lingvoj.

Tiamaniere, la modelo de deviga lingvoinstruado povas esti jena:

- **Modelo 1**

**Lernejo:**

*Elementaj klasoj – 204 horoj (Esperanto);*

*5–9-aj klasoj – 525 horoj (fremda lingvo);*

*10–11-aj klasoj – 210 horoj (fremda lingvo).*

**Superlernejo:**

*340 horoj (fremda lingvo).*

- **Modelo 2 (por lernejoj, kiuj ne studi(a)s Esperanton en lernejo)**

**Lernejo:**

*Elementaj klasoj – 204 horoj (fremda lingvo);*

*5–9-aj klasoj – 525 horoj (fremda lingvo);*

*10–11-aj klasoj – 210 horoj (fremda lingvo).*

**Superlernejo:**

*100–200 horoj (Esperanto);*

*140–240 horoj (fremda lingvo).*

La supremenciitaj rezultoj de la esploroj kaj la sperto de rusiaj kaj eksterlandaj lernejoj permesas konkludi, ke Esperanto-instruado:

- *en la skalo de lernejo (superlernejo)*

- (1) konsiderinde plifaciligas postan lernadon de fremdaj lingvoj kaj aliaj studobjektoj;
- (2) plialtigas efikecon de lingva instruado;
- (3) ŝparas tempon kaj fortostreĉojn: dum la sama tempoperiodo la studentoj lernas du lingvojn kun multe pli bonaj rezultoj;
- (4) kreas pli vastajn eblecojn por internacia komunikado de lernejoj kaj ilia integrado en internacian klerigan spacon sen lingva diskriminacio;

- *en la skalo de ŝtato:*

- (5) ŝparas la buĝeton je apartaj kostoj de lernado de dua fremda lingvo;
- (6) sen aldonaj elspezoj altigos konkurenckapablon de la civitanoj en labormerkato pro ilia multlingva kompetenteco;
- (7) permesos altiri rimedojn al la interna merkato de la ŝtato per produktado de varoj kaj servoj, ligitaj kun ĝia instruado.

Malgraŭ la agnoskita efikeco de la Modelo 1, Eŭropa Jurscienca Universitato sukcese uzas la Modelon 2 dum 11 jaroj, kun propedeŭtika kurso anticipanta lernadon de la latina, angla kaj aliaj lingvoj. Inter la avantaĝoj, kiujn ricevas la studentoj, estas evoluo de krea lingvopensado, facila venko de psikologia bariero, altiĝo de intereso al lernado de vasta spektro de etnaj lingvoj. La efikeco de la modelo nedirekte konfirmiĝas per tio, ke ĉiu deknua universitata fininto laboras aŭ daŭrigas lernadon eksterlande.

Atentante la suprediritan, la situacion “Lingvolernado estas malfacila, longa, kosta” eblas kaj necesas optimumigi, laŭvoje solvante alian globalan taskon: kontribui al konservado kaj bonfarto de granda lingva familio. ▲

